

# Eŭropa Bulteno

---

Oktobro 2008, № 10 (75)

---

*Karaj legantoj,*

*Jen nova numero de Eŭropa Bulteno. Mi elkore dankas al la kontribuintoj kaj invitas vin aktive partopreni en aperado de la sekvaj numeroj de nia gazeto. Viaj kontribuoj estas valoraj, ĉar ili ebligas informadon pri vasta agado de nia organizo. Atendante viajn artikolojn mi deziras al vi agrablan legadon.*

*Vesna Obradović*

## **KUNSIDO EN BRUSELO: AKTIVA EŬROPA CIVITANECO**

La 3an de oktobro 2008 en Bruselo Seán Ó Riain kaj Maja Tišljár partoprenis kiel reprezentantoj de EEU kunvenon de la laborgrupo Aktiva Eŭropa Civitaneco kadre de la programo „Eŭropo por Civitanoj“.

La programo „Eŭropo por Civitanoj“ de Eŭropa Komisiono celas proksimigi Eŭropon al la civitanoj kaj ebligi al ili partopreni en konstruado de Eŭropo. La programo ĉiujare finansas multajn unuopajn projektojn, urboĝemeligojn kaj funkciadon de kelkaj eŭropaj neregistaraj organizoj kiuj plenumas la celojn de „Eŭropo por Civitanoj“. Inter la organizoj kiuj ĉi jare sukcesis ricevi subvencion por normala funkciado estis ankaŭ EEU. Reprezentantoj de EEU pro tio estis invititaj partopreni en la laborgrupo: Aktiva Eŭropa Civitaneco.

Pere de la laborgrupo Eŭropa Komisiono celas dialogon kun organizoj kiuj laboras sur la kampo de aktiva eŭropa civitaneco. La ideo estas diskuti pri la politiko kaj metodologioj por aktiva partoprenado de civitanoj en eŭropa funkciado. La grupo devus regule kunveni por interŝanĝi vidpunktojn, priparoli spertojn kaj rezultojn de propraj aktivecoj kaj kontribui al organizado de ĉefaj eventoj de la programo Eŭropo por Civitanoj.

Dum la kunveno la temoj estis laborprogramo de la programo por 2010, realigo de la temaj prioritatoj por 2009, la plej videblaj eventoj kiel tiuj ligitaj al la prezidado de la membrolandoj de EU kaj estonta laboro de la laborgrupo. Por EEU partopreno en la laborgrupo estas grava ebleco kunlabori kun la Komisiono plibonigante la programon kaj aŭskultante pri la sukcesoj kaj malsukcesoj de aliaj kunlaborantaj organizoj. La organizoj tiel mem povas partopreni en difinado de la celoj kaj ĉefaj temoj por la programo Eŭropo por Civitanoj kiuj poste estas la bazo laŭ kiu la subvencioj estas aprobatataj aŭ malaprobatataj. La prezidanto de EEU Seán Ó Riain plurfoje kontribuis al la diskutoj prezentante la laboron de EEU kadre de la programo. La partopreno en tiaj kunvenoj estas ankaŭ grava okazo konatiĝi kun aliaj organizoj kaj komisionoj kiuj respondecas pri la programo.

**Maja Tišljár**

## HERZBERG - ESPERANTO-URBO PREPARAS EŬROPAN ESPERANTO-KONGRESON 2009



Inter la 2-a kaj 5-a de oktobro okazis Torpedo (Tutlanda Oktobra Renkontiĝo de Pedagogoj) en Esperanto-urbo Herzberg/Harz, en kiu mi intreralie gvidis rapidan tritagan kurson de baza Esperanto por plenkreskuloj laŭ la Zagreba Metodo. Partoprenis 6 personoj kaj dum la tri tagoj mi instruis ĉiutage po 4 lernejoj horoj (entute 12 horoj). Ni pristudis 3 lecionojn el la Zagreba lernolibro kaj multe ekzercis. Mi (surprize ankaŭ por mi) konstatis ke la kursanoj akiris dum tiuj 3 tagoj la scion de Esperanto je la nivelo A1 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (dum

Torpedo ni studis ankaŭ ĉi tiun dokumenton, kaj fine realigis ekzamenon en kiu mi testis la postulatajn kapablojn laŭ la Referenckadro por la nivelo A1).

La teoriajn aspektojn de pedagogia laboro gvidis sinjoro Rudolf Fischer, la praktikajn kiel ekz.



rolludojn en edukado Stefano Mac Gill kaj la Che Metodon prezentis sinjorino Sabine Trenner.

La tuton organizis la nelacigebla teamo de Herzberg, sinjoro Peter Zilvar kaj sinjorino Zsófia Kóródy.

Ni trovis ankaŭ iom da tempo por promenoj kaj ni vizitis novloĝantojn de Herzberg, gesinjorojn Schicke kaj la urban kastelon.

Ankaŭ kunsidon pri la okazonta EEU-kongreso ni okazigis en kiu partoprenis 3 membroj de LKK kaj mi. Mi eksciis ke la preparoj tre bone funkcias. Oni jam havas

preskaŭ pretan kulturalan programon. Estas rezervitaj necesaj ejoj por la kongresa programo kaj loĝigaj kapacitoj. La programon kaj la aliĝilon oni povas trovi ankaŭ enrete che [www.ic-herzberg.de](http://www.ic-herzberg.de). La unua kaj la plej konvena aliĝlimdato estas la fino de novembro. La urbestro de Herzberg invitis la urbestron de Bjalystok al la kongreso (supozeble ili parolos ankaŭ pri eventuala proklamo de Bjalystok kiel Esperanto-urbo). Dum la kongreso okazos ankaŭ la 3-a SALO, skolta tendumado de infanoj en kiu partoprenos ankaŭ infanoj el la anglaj urboj kiuj lernas Esperanton kadre de Springboard-eksperimento.

La ĉeftemo de la kongreso estas: »Esperanto por multkultura Eŭropo" kaj kadre de la kongreso okazos ankaŭ du-taga eŭropa konferenco (la 29-an kaj 30-an de majo 2009) "Signifo de falo de Berlina Muro por interhomaj kontaktoj inter Orienta kaj Okcidenta Eŭropo".

La kongreso certe estos memorinda kaj planu vian venon laŭeble frue. Vi faciligos la laboron al la organizantoj kaj certigos al vi pli kvalitajn loĝeblecojn kiuj estas limigitaj.



**Zlatko Tišljar**

## PLIAN FOJON ONI MENCIIIS ESPERANTON EN EŬROPA PARLAMENTO

La 7-an de oktobro 2008 vespere en Bruselo Jozef Reinvar't kaj mi (en la foto) ĉeestis memorigon pri la tragike mortinta profesoro Bronislaw Geremek, antaŭa pola ministro pri eksteraj aferoj, kaj unu el la vicprezidantoj de la Eŭropa Parlamento. La ĉefa parolanto estis brita EP-ano Graham Watson, la ĉefo de la EP-a grupo kies membro estis Geremek, la liberaluloj/ALDE, la tria plej granda grupo en la Eŭropa Parlamento. Ĉeestis multaj EP-anoj kaj aliaj kolegoj de Geremek. Watson citis el mesaĝo kiun mi antaŭe sendis al li, ke Geremek kapablis elmemore citi el la esperantlingva traduko de "Pan Tadeusz" (Sinjoro Tadeo) de Mickiewicz, kaj ke "Esperanto estis unu el la lingvoj, kiujn Geremek bone parolis". Watson menciis neniun alian lingvon.




Poste Jozef kaj mi parolis kun li kaj petis lian subtenon por la "Geremek-Grupo" en la Eŭropa Parlamento. Li diris ke li pripensas la aferon, kaj parolis pozitive pri la artikolo de Etsuo Miyoshi en LE MONDE la 9-an de septembro, kaj pri nia agado disdoni ĝin papere al ĉiuj membroj de la Eŭropa Parlamento.

Ankaŭ ĉeestis Siim Kallas, vicprezidanto de la Eŭropa Komisiono, kiu reprezentis la prezidanton Barroso, kaj kiu parolis honore al Geremek. Li sidis apud Graham Watson.

**Seán Ó Riain**

## NOVA VERKO PRI VIKIPEDIO APEROS NOVEMBRE



Ziko van Dijk estas aŭtoro de freŝa verko „Vikipedio por vi“, kiun eldonos novembre E@I.

Temas pri 64-paĝa libreto en A5 formato, kiu prezentas la fenomenon Vikipedio kaj klarigas, kiel pli bone utiligi la liberan enciklopedion. Per konsiloj kaj ekzemploj ĝi priskribas kiel oni mem fariĝas sperta vikipediisto.

Post granda sukceso kaj disvendo de la poŝformata broŝureto „Vikipedio – praktika manlibro“ E@I daŭrigas sian agadon por antaŭenigi E-lingvan Vikipedion. Krom la eldonoj la organizo okazigas ankaŭ seminariojn pri Vikipedio kaj ĝia uzado kaj redaktado kaj proponas helpon de spertaj vikipediistoj. Pli da informoj ĉe:

<http://vikio.ikso.net/Projektoj/Vikipedio>

Kaj fine rekte vortoj de Ziko van Dijk de la libro-kovrilo:

„Vikipedio en Esperanto estas nuntempe la sola vere universala enciklopedio en Esperanto, kun pli ol cent mil artikoloj priesperantistaj kaj neesperantistaj temoj. Vikipedio donas al nia lingvo pli da estonteco.

Por antaŭenigi Esperantan Vikipedion E@I registris novan domajnon [www.vikipedio.net](http://www.vikipedio.net), kie ekde novembro aperos detaloj pri la projekto „Vikipedio por ĉiuj“.

**Peter Baláž**

## **SE EĈ UEA ALPRENAS STARPUNKTON PRI LINGVAJ RAJTOJ, ĈU ANKAŬ EEU, NIA ORGANIZAĴO EN EŬROPO, NE DEVUS ALPRENI STARPUNKTON PRI LINGVAJ RAJTOJ EN EU?**

Universala Esperanto-Asocio lastatempe aperigis en retejo, <http://www.lingvaj-rajtoj.org/eo/lingvaj-rajtoj.html> kaj en Gazetara Komuniko sian starpunkton pri lingvaj rajtoj. Ni kopias ĉi tiun tekston ĉi tie por ke ankaŭ la legantoj de ĉi tiu eŭropa revuo estu informataj. Lingvaj rajtojn oni ne nur rompas en Tibeto aŭ en Birmo, sed oni multe pli decide kaj senkompatate rompas en Eŭropo.

Ĉiuokaze, jen la teskto de UEA:

"Lingvaj rajtoj estas esencaj por ĉiu popolo, sendepende de la grandeco de ties membraro. Tiu rajto devas esti protektata ĉefe por malgrandaj grupoj. Universala Esperanto-Asocio (UEA) subtenas minoritatajn lingvojn ekde pli ol 100 jaroj.

La rajto de infanoj lerni sian gepatran lingvon kaj daŭrigi sian edukadon uzante sian gepatran lingvon, ne nur estas grava por ilia kulturo, sed estas fundamenta por ilia psika evoluo. Pluraj larĝskalaj studoj en multaj diversaj landoj demonstris, ke se indiĝenaj kaj minoritataj infanoj estas edukataj ĉefe uzante sian gepatran lingvon, kiel lingvon de la instruado dum la unuaj 6-8 jaroj (kun samtempa, bona instruado de la reganta lingvo kiel dua lingvo, fare de dulingvaj instruistoj), ilia ĝenerala progreso estas pli bona kaj ili lernas la regantan lingvon pli bone ol se ilia instruado okazus per la reganta lingvo. Se ilia instruado en la gepatra lingvo okazas nur dum unu aŭ du jaroj, kaj poste ili devas transiri al la uzo de la reganta lingvo, eble ili bone sukcesas tiel komence, sed ĉirkaŭ ekde la kvara lernoĵaro, ilia progreso malrapidiĝas, kaj la diferenco inter ili kaj la infanoj parolantaj denaske la regantan lingvon plukreskas.

Ankaŭ tio estas grava ke la homoj kapablu komuniki je diversaj niveloj. UEA rekomendas lerni 2, 3 aŭ 4 lingvojn, laŭ la cirkonstancoj, t.e.

1. la gepatran lingvon
2. la regionan lingvon, se malsamas
3. la nacian lingvon, se malsama ol la du unuaj
4. internacian lingvon, kiu apartenas al neniŭ nacio, kaj kio estas: Esperanto.

Esperantistoj scias, ke kiam multnacia grupo uzas neŭtralan, komunan lingvon, la kvalito de la komunikado estas ege specifa. La fina celo de Esperanto estas strebi al paco inter popoloj, plifaciligante la komunikadon kaj igante tion pli justa. Uzo de komuna lingvo evitas tian situacion, en kiu la personoj uzantaj sian gepatran lingvon havas grandegan avantaĝon super la aliaj.

Ni dezirus ke Unuiĝintaj Nacioj pripensu tiun temon koncerne siajn proprajn kunvenojn. La diferenco estas tre evidenta kiam oni aŭdas partoprenantojn, kiuj sin esprimas en la angla, la franca aŭ la hispana, kaj por kiuj tiu estas ĉu la dua, ĉu la tria lingvo. Kiam parolanto ekparolas uzante sian gepatran lingvon, ofte la diferenco estas impresa - kion li diras, havas multe pli da pezo kaj multe pli allogas la atenton, ol parolanto kiu utiligas fremdan lingvon.

La granda espero de Esperantistoj estas ke la mondo iĝas pli paca loko, kaj ni kredas ke efika komunikado ludas tre grandan rolon por atingi tiun celon."

Ĉu ĉi tio ne aplikeblas en Eŭropo? Ĉu ni vivas en Paradizo de Homaj Rajtoj inkluzive de la lingvaj rajtoj? Por komenci mi pensas, ke pluraj eŭropanoj provas grandelane revenigi la situacion de homaj rajtoj en Eŭropo malantaŭen. Ĉiuj artikoloj pri sociaj sekurecoj, rajto je laboro kaj rajto je digna vivo estas nun atakataj, ĉie en Eŭropo surbaze de la ununura triumfanta penso pri la merkato kiel granda savanto pri ĉio.

Sed pli specife pri lingvaj rajtoj oni provas malhoneste, ĉar ne rekte kaj deklarante la malon, igi Eŭropon la okcidenta periferio de la usona imperio, en kiu oni, kompreneble, parolu la lingvon de la imperio, tiel neante siajn lingvajn rajtojn al ĉiuj popoloj en Eŭropo [Provizore oni ŝajnigas favori la francojn kaj la germanojn, sed temas pri io dumtempa].

Mi kredas, ke EEU devas klare montri la pozicion de esperantistoj fronte al la maljustaĵoj, kiujn oni planas kaj efektivas. Eble neniu atentos nin. Eble, sed almenaŭ ni estos dirintaj al la agentoj de la imperio, kion ni pensas pri ili.

Ni diru tion en pozitiva maniero, se vi volas, ekzemple per frazoj de la speco: "Por justeco en la internaciaj rilatoj" kaj similaj, sed ni diru tion. Estu certaj, ke oni ne akceptos Esperanton pro lingvaj ecoj (precizeco, reguleco) aŭ pro financaj ecoj (ni ŝparos tiom kaj tiom) sed eventuale nur pro politikaj kialoj (ni volas esti ĉiuj egalaj).

Unuvorte EEŬ, laŭ mi, devus komenci labori per la koncepto pri "lingvaj homaj rajtoj" (kion kelkaj estraranoj de EEU jam faras tre bone en siaj paroladoj).

**Renato Corsetti**

## **TRIESTA E-SOCIETO: EKZEMPLA LABORO**

La 7-an de oktobro okazis en itala urbo Triesto ronda tablo dediĉita al la UN-jaro de la lingvoj, kiun organizis Asocio de Triestaj Esperantistoj kaj aŭspiciis regiona komunumo (Provincia di Trieste) kaj Universita degli Studi di Trieste. La aranĝo estis publika kaj organizita en Granda salono de Supera Lernejo por modernaj lingvoj kaj tradukistoj en centro de la urbo sub la nomo "Malfermita pordo - lingvoj sen limoj". La prelegantoj estis ĉefe fakuloj neesperantistoj krom mi kaj Ranieri Clerici. parolis Giovanni Gregori (fakulo pri turismo, bankismo kaj historio), Lorenza Rega (lingvisto), Bojan Brezigar (prezidanto de Eŭropa Asocio por Minoritatoj), Paolo Alessi (funkciulo de UNESCO), mi - kiel sekretario de EEU kaj Raineri Clerici kiel vicprezidanto de UEA. Krom mi, ĉiuj parolis en la itala, ja la aranĝo estis dediĉita al la ĝenerala publiko. Ĉeestis kelkaj ĵurnalistoj kaj kvindek da aŭskultantoj. Oni taksis la aranĝon tre kvalita.



Poste la organizantino Edvige Ackermann gvidis nin al la sidejo de la Esperantista Asocio, kiu estas mirinde granda en la urbocentro kun pluraj belaj ejoj, por konferencado, kursgvidado, administrado. Evidente la triestaj esperantistoj havas je dispono la plej belajn ejojn el ĉiuj italaj grupoj kaj certe unu el la plej belaj entute inter la lokaj E-societoj. Por povi pagi la luon la societo devas esti tre aktiva por gajni subvenciojn kaj ĝi estas tia. Certe ekzempla laboro kaj imitinda.

**Zlatko Tišljar**

## KUNVENO DE LINGVOINSTRUISTOJ EN FLORENCO

La 2an de oktobro 2008 mi partoprenis en Florenco al kunveno organizita de ANILS (Associazione Nazionale Insegnanti Lingue Straniere – Nacia Asocio de Instruistoj pri Fremdaj Lingvoj). La temo de la kunveno estis: La societa globale, come formare gli insegnanti di lingue per essere al passo coi tempi - La tergloba socio, kiel forĝi la lingvoinstruistojn por postsekvi la tempojn.

La organizintoj petis al mi mallongan paroladon pri Esperanto, ĉar antaŭ kelkaj monatoj mi jam faris ion similan dum la tiama ANILS-kunveno.

Bedaŭrinde, en la programo, mia parolado aperis kiel la lasta, proksimume je la kvina kaj duono posttagmeze, kaj sen titolo (kompreneble mi sendis la titolon pli frue kaj ĝustatempe: Esperanto per la societa globale - Esperanto, lingvo por la tergloba socio, tamen oni tute neglektis ĝin).

Kiam mi ekparolis, ĉeestis deko da homoj, plejmulte instruistoj sed aŭskultis kaj rigardis ankaŭ du ĉarmaj fraŭlinoj, kiuj reklamadis komputilvortaron. Je la komenciĝo de la posttagmezo estis en la ĉambro 30 homoj, matene eble 50. Mi parolis dum 15 minutoj sufiĉe flue, klare kaj alloge. Mi komencis per esperantaj frazoj, poste mi parolis pri lingva demokratio, pri esperanta kurso por ĝisdatigi la instruistojn, fine pri tri aktualaĵoj: la oficiala prezentado de Nacia Biblioteko de Esperanto en Massa (la 25an de oktobro), la kunveno pri Internacia Jaro de la Lingvoj en Florenco (la 25an de novembro) kaj la lerneja projekto pri fremdaj vortoj en itala lingvo, planita de la asocio "Allarme lingua" (Alarmo por lingvoj), aprobita de UNESKO kaj subtenata de la itala sekcio de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

**Leonardo Pampaloni**

## EŬROPA SOCIA FORUMO



Dana Esperanto-Asocio, Sveda Esperanto-Unio kaj Eŭropa Esperanto-Unio partoprenis kune en aranĝoj dum la Eŭropa Socia Forumo kiu okazis de la 17a ĝis la 21a de septembro en Malmö, Svedio. Dum ĉiuj tagoj funkciis budo, kie la deĵorantoj vigle diskutis kun la vizitantoj kaj disdonis centojn da flugfolioj en diversaj eŭropaj lingvoj, afable senditaj de la diversaj Esperanto Asocioj de EEU. La 20an de septembro la prezidanto de EEU Séan O'Riain prelegis pri la temo: "Egalrajta interkultura dialogo en tutmondiĝanta mondo" kaj Lars Forsmann

enkondukis la partoprenantojn al rekta metodo de lernado. Posttagmeze okazis granda manifestacio kun partopreno de pli ol 15 000 personoj, kie ankaŭ la esperanto-movado estis reprezentata.

**Ileana Schroeder**

## AGO-SEMAJNO – NOVJARA E-ARANĜO DEBUTE EN SLOVAKIO

Junulara internacia Esperanto-aranĝo Ago-Semajno okazos ĉi-jare unuafoje ekster la limoj de Pollando, tamen ĝi ne „forkuros“ tro for de la limoj – debute ĝi okazos en Slovakio, en urbo Liptovský Mikuláš, en la tagoj 27.12.2008 - 4.1.2009.

La aranĝo ĉi-jare ricevis ĉefan temon „Lingvoj – pordo al interkulturo“. Al tiu temo estos ankaŭ ligitaj pluraj programeroj – okazos multaj fulmaj lingvokursoj (slovaka, pola, ukraina, rusa, nederlanda, ...), kvizoj pri lingvoj, diskuttrondoj.

Krom la eduka, serioza programo estas certe preparata bunta kultura kaj amuza programo – ludoj, ekskursoj, manlaboroj, koncertoj, diskoteko, jam tradicia „KLF“ - Kultura kaj Lingva Festivalo...

Dum lastaj tagoj de la aranĝo (kaj la unuaj de Nova jaro) okazos kunfandiĝo de AS kun jam tradicia E-aranĝo en Liptov-regiono „Poludnica aŭ „Renkontiĝo de Esperantistoj – vojaĝantoj kaj turistoj“. Ĝi kutime havas 2 partojn – supreniron al la montopinto Poludnica kaj aldone prelegojn kaj prezentojn de vojaĝoj de E-istoj tra interesaj lokoj dum la antaŭa jaro.

Hejmpaĝo de la aranĝo: [www.as.pej.pl](http://www.as.pej.pl) - via aliĝo estas bonvena - simple venu :)

**Peter Baláž**



**8A EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO**  
**86A GERMANA ESPERANTO-KONGRESO**  
**HERZBERG AM HARZ - LA ESPERANTO-URBO**  
**28.05.-03.06.2009**

### Ĉeftemo: Esperanto por multkultura Eŭropo

Je la unua fojo en la historio la Esperanto-movado forlasos sian kutiman kongresejon kaj prezentos sin en la urbo multloke kaj multflanke: ekzemple okazos

- publika kantado en la urbo kun lokaj infanoj kaj Esperantista kantisto,
- kongresanoj partoprenos en la procesio okaze de la tradicia popolfesto,
- estas planite vizitoj al firmaoj, lernejoj, kluboj.

Atendos vin varia kulturprogramo dum la nacia vespero: multaj artistoj, muzikistoj, dancistoj kaj ankaŭ prezentantoj el la loka gimnazio, kiu donos hejmon por nia kongreso. Ankaŭ dum la internacia vespero vi trovos abundan muzik- kaj teatroprogramon.

Dum la kongreso okazos ankaŭ Eŭropa Konferenco organizata de Eŭropa Esperanto-Unio sub la temo: **Signifo de la falo de Berlina muro por interhomaj kontaktoj inter Orienta kaj Okcidenta Eŭropo**

Informoj kaj aliĝilo troveblas ĉe: <http://www.gek-eek.esperanto-urbo.de/page.php?pid=62384463>

## PRELEGO EN LA UNIVERSITATO DE GALWAY (OKCIDENTA MARBORDO DE IRLANDO)



Mi prelegis la 18-an de oktobro 2008 kaj ĝi estis grandega sukceso - ĉeestis pli ol 40 personoj. Estis 2 aliaj samtempaj prelegoj kaj tre interesaj paroladoj, sed nur 4 homoj venis al unu el ili!

Ege bonŝanca afero estas ke la prezidanto de la Universitato, D-ro Browne, parolis la unuan tagon por malfermi la konferencon. Kvankam estis 40 paroladoj dum la konferenco, la prezidanto menciis nur la prelegon pri "EO por plibonigi la lernadon de la irlanda", kaj rekomendis al la kolegoj ĉeesti ĝin! Ĉar mi timis ke ne

sufiĉe da kolegoj venos, mi estis organizinta etan ekzpozicio de EO-libroj dum la 2 antaŭaj tagoj. Temis pri libroj pri EO en la irlanda kaj tradukoj al EO el la irlanda, la nova enciklopedio de Geoffrey Sutton, ktp. Mi ankaŭ parolis al laŭeble multaj kolegoj pri la afero.

Ĉiuj ĉeestantoj estis profesoroj de la irlanda, aŭ iliaj kolegoj en la diversaj irlandaj universitatoj, kaj mi renkontis multajn el Nord-Irlando.

La tuja reago post la prelego estis ke la 5 ekzempleroj de la EO-kurso en la irlanda, "EO Tríd an Modh Díreach" tuj vendiĝis. Multaj gratulis, kaj diris ke la prelego sukcesis komplete ŝanĝi ilian sintenon al EO. Neniu kontrauis, kaj nur unu profesoro private diris al mi ke li ankoraŭ ne kredas ke oni povus lerni la 500 plej oftajn morfemojn en EO tiom rapide. Sed li estas iom pesimisma: li kredas ke, se la nuna evoluo daŭros, post 100 jaroj estos mortintaj ĉiuj skandinavaj lingvoj kaj la nederlanda! Espereble li troigas, sed li pensigis min.

La redaktoro de "FEASTA", la monata revuo de la irlandlingva movado kaj ĵus elektita prezidanto de la movado, Conradh na Gaeilge, kiu nomiĝas Pádraig Mac Fhearghusa, ĉeestis. Poste li tuj venis al mi, kaj volis publikigi mian paroladon en "FEASTA".

**Seán O'Riain**

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 27-an de oktobro 2008.

Redaktoro: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Seán O'Riain, Peter Baláž, Maja Tišljár, Renato Corsetti, Leonardo Pampaloni, Ileana Schroeder kaj Vesna Obradović

Kontakto: [vesna.obradovic@gmail.com](mailto:vesna.obradovic@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, [www.europo.eu](http://www.europo.eu)



Co-financed by the European Union within the programme "Europe for Citizens" 2007 – 2013.